April 1913. 4e Jaargang No. 4 (40)

Nederlanda Katoliko

Maandblad, Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko", gevestigd te 's Hertogenbosch, opgericht 29 Augustus 1909, bisschoppelijk en koninklijk goedgekeurd.

Ĉion per amo, nenion per forto. *(S. Franc. de Sales).*

EERSTE ROOMSCH KATHOLIEKE
Levensverzekering-Maatschappij
:- te HAARLEM, Kleverpark 67 -:

Tel. Interc. 1784. **Telegram-adres ERK**

Met Kerkel. goedk. van doel en Koninkl. goedk. der Statuten.

Aantal Polissen op heden	13,500.—
Verzekerd bedrag pl.m. twee en een half millioen	f 2.500.000.—
Jaarlijksche Premie pl.m.	85.000.—
Het aantal contracten ging in 1912 vooruit met	5.866.
Het verzekerd Kapitaal „ „	1,150.000.—
De Jaarlijksche Premie „ „ „ „ „	39.000.—
Ontvangen aan premiën en koopsommen over 1912 . .	100.000.—
Bedrag aanwezig voor reserve pl.m. .	95.000.—
Het aantal polissen in Februari 1913 uitgereikt bedroeg ruim	900.
Met een verzekerd Kapitaal van pl.m.	150.000.—

HAARLEM, 1 Maart 1913.

De Directeuren:
H. J. BODENSTAFF.
C J. Th. SMITS.

Moerkerk-Banden.

Nog verkrijgbaar à f 0,25 franco per post, bij vooruitbetaling: Omslagen voor den 1e, 2e, en 3e Jaargang van „*Nederlanda Katoliko*". Luxe Papier. Bandteekening van Herman Moerkerk.
Adres: ST. CRISPIJNSTRAAT 57, 's-BOSCH.

HAMMOND SKRIBMAŜINO LA PLEJ BONA!

La Hammond-Kopiejo.

Sin okupas pri la kopiado de tagordoj, cirkuleroj, regularoj.

Same de

Leteroj, Polisoj, Diktaĵoj, Kontraktoj, Protokoloj, Vendejaj kaj borsaj sciigoj k. t. p.

Sekretigeco, rapida liverado, neta kaj akurata faraĵo garantiata.

Sekretarioj de unuiĝoj, postulu nian specialan prezaron. Diversaj referencoj estas disponeblaj.

Amsterdamo. -:- Rokin 38.

TELEFONO 4443.

La „STELIOJ" - Cigaredoj estas fumataj en 'Hinujo, Japanujo, Afriko, Indio, k.t.p.
En Eŭropa la uzado ĉiam kreskas.
PETEGU en via loko la „Steliojn"
1 ĝis 4 c.)

April 1913. 4e Jaargang No. 4 (40)

Nederlanda Katoliko

Maandblad, Officieel Orgaan van den Nederl. R.-Kath. Esperantistenbond „Nederlanda Katoliko", gevestigd te 's Hertogenbosch, opgericht 29 Augustus 1909, bisschoppelijk en koninklijk goedgekeurd.

Ĉion per amo, nenion per forto. *(S. Franc. de Sales).*

Hoofdredacteur:
J. N. J. Smulders, Arts te Udenhout.

Abonnementsprijs,
p.jaar, franco p. post, bij vooruitbetaling
Nederland (niet-leden). . . *f* 1.—
België . . . Sm. 0,87 = - 1,06
Andere landen (aliaj landoj)
Sm. 1,04 = - 1,24
Afzonderlijke nummers 10 cent.

E S P E R A N T O

Redactie en Administratie:
H. Damen, St. Crispijnstr. 57, 's Bosch.

Advertentieprijs,
per regel 10 cts.
Bij geregelde plaatsing aanzienlijke korting.
Voor inlichtingen wende men zich tot de administratie.

Jaarvergadering.

Reeds staat de dag van 20 April voor de deur. Velen reeds gaven kennis te zullen deelnemen, anderen zijn wellicht reeds besloten dezen jaarvergaderingsdag bij te wonen, doch vergaten nog dat te doen blijken. Deze laatsten mogen wij bij dezen wel even aansporen, van hun besluit onverwijld kennis te geven. Want men wachte daarmede toch niet tot het laatste oogenblik. Dat zou immers de regeling allicht eenigszins in de war kunnen sturen. En voor de betrokken personen zelf, nog eenigerlei moeilijkheid kunnen veroorzaken bovendien. Die komen zijn natuurlijk op de eerste plaats de getrouwen. Tot de getrouwen gaan zij behooren die óók nog maar eenmaal eene jaarvergadering, Esperanto-congres of streekvergadering bijwoonden. Want die eerste kennismaking moet hen noodzakelijk hebben in aanraking gebracht met de onveranderlijk gezellig-vriendschappelijke geest, die deze bijeenkomsten kenmerkt en die voor alle Esperantisten eene eigenaardige aantrekkingskracht schijnt te bezitten. De geringe afstanden in ons kleine landje kunnen natuurlijk voor niemand een bezwaar zijn, vooral ook omdat de Esperantisten, met name de katholieke Esperantisten — jammer genoeg — in de noordelijke provinciën erg schaarsch zijn.

Doch de oplettende lezer zal uit het programma van den dag, zooals dat te vinden is in ons Maartnummer, wel begrepen hebben, dat dit maal méér dan ooit het karakter eener propagandabetooging voorop staat. En dus moet ook het getal deelnemers groot zijn, meer dan ooit. Welnu, dat kan! En daaraan behoeft ook

volstrekt geen twijfel te bestaan. Want de gunstige ligging van 's-Hertogenbosch, waar zelf eene opgewekte Esperanto beweging gaande is, begunstigd door eene „bonne presse" die den Bosschenaren inderdaad wat Esperanto en Esperantisme betreft allerminst onkundig laat — die gunstige ligging tenopzichte van eenige nieuw opgerichte Katholieke Esperanto-vereenigingen geeft alle hoop op ruime deelname van die zijde. Daarenboven is door het bestuur der Bossche aldeeling geen moeitegespaard, alles aan te bieden wat mogelijk is.

Men zie slechts het programma. En zelfs vermeldt het programma niet alles wat den deelnemers zal worden aangeboden. Wie kan dus nog aarzelen? De grijze Hertogstad bereidt aan allen eene feestelijke ontvangst. Het bestuur zal wel zorgen dat 's morgens aan het station eenige leden aanwezig zijn. Men heeft zeker het lijstje wel opgemerkt in het vorige nummer, waarop de morgen en avond treinen voor alle richtingen zijn aangegeven. Die nog niet besloten was, besluite dus thans, raadplege nog even de advertentie in dit nummer en geve daarna onverwijld kennis van zijn besluit tot deeelname Niemand, die later zijn beslnit zal betreuren.

H.D.

Traduko el la komparaĵoj de Johano Jörgensen.

La fadeno de supre.

Estis bela septembra mateno. Ĉiuj herbejoj brilis de roso, kaj tra la aeron veladis la silksimile brilantaj fadenoj de l'forfluganta somero. De malproksime ili alvenis, kaj malproksimen ili preterŝvebis.

Unu el tiuj fadenoj firmiĝis sur la supron de ia arbo, kaj la aerovojaĝinta, malgranda flave kaj nigre spruĉmakulita araneo, forlasis sian malpezan fadenon, kaj deiris al la pli firma fundo de l'foliaro.

Tamen la loko ne multe plaĉis al ĝi, kaj baldaŭ decidinte ĝi ŝpinis alian fadenon, kaj sin deglitigis per la fadeno en vastan dornbarilon.

Ĉi tie la kreskemaj branĉetoj sufiĉis, por ŝpini inter tiuj araneaĵon. Kaj la araneo komencis al laborado, dum la fadenon de supre, per kiu ĝi estis deirinta malsupren, ĝi tenigis la plej supran angulon de l'araneaĵo.

Fariĝis granda belega araneaĵo. Kaj estis karakterize, ke ĝi kvazaŭ ŝvebadis en la senaĵa aero, dum oni ne povis eltrovi, per kiu la elplej supra rando de l'araneaĵo estis tenata. Ĉar la okuloj devas esti bonaj, kiuj trovas tian malgrandan kaj maldikan fadenon de l'araneaĵo.

Tagoj eklumis, tagoj pasis. La muŝkaptaĵo ne estis plu riĉa, kaj la araneo estis devigata pligrandigi sian teksaĵon, por ke ĝi povu sin etendi ĉirkaŭen pli malproksimen, kaj kapti pli da muŝoj. Kaj dank al la fadeno de supre ĉi tiu pligrandigo prosperis ekster ĉiuj supozoj. La araneo teksis sian araneaĵon pli kaj pli alten en aeron kaj pli kaj pli larĝe al ĉiuj flankoj. La teksaĵo sin etendis sur la tuta larĝo de l'dornbarilo, kaj kiam en la malseka oktobra mateno ĝi pendis plene de l'brilegantaj akveroj, ĝi similis perlitan vualon.

La araneo estis fiera je sia faritaĵo. Ĝi ne plu estis tiu malgranda estaĵaĉo, kiu sur fadeno araneaĵa aliris veladante, kvazaŭ sen ia cendo

en poŝo, kun posedaĵo ne alia ol sia ŝpinilo. Nun ĝi estis granda, bonfartanta, memfida araneo kaj posedis la plej vastan araneaĵon de l'tuta barilo.

Ian matenon ĝi ekvekis kun eksterordinare kolera kaprico. Nokte iom frostis, kaj nun ne estis videbla suna radio, kaj ne unu muŝo bruetis tra la aeron. Malsatema kaj senlabora la araneo tie pendis la tutan longan tagon grizan.

Por mortigi la tempon, ĝi ĉirkaŭenpromenadis sur sia reto, por esplori, ĉu ne ĉi tie aŭ tie la fadenaro estus plibonigebla. Ĝi tiris al ĉiuj fadenoj por ekzameni, ĉu ili fortike firmiĝis. Kvankam ĝi ja nenion trovis malfirma, ĝi tamen estis kej restadis nesufereble riproĉema.

Tiam je la plej ekstera rondo de l'teksaĵo ĝi renkontis fadenon, kiu subite ŝajnis al si tute nekonata. La aliaj fadenoj direktiĝis ĉiuj tien aŭ ĉi tien - la araneo konis ĉiun branĉeton, je kiu ili estis alfirmitaj. Tiu-ĉi neklarigebla fadeno direktiĝis nenien, tiel estas, ĝi direktiĝis ĝustrekte supren en aeron.

La araneo sin altigis per siaj malantaŭaj kruroj kaj vigle vidadis supren per siaj multaj okuloj. Ĝi tamen ne povis trovi kien la fadeno alkuris. Ja ŝajnis, kvazaŭ ĝi ĝustrekte direktiĝis en la nubojn.

La araneo koleriĝis des pli, ju pli longe ĝi tie sidis, kaj vane rigardadis supren. Ĝi neniel plu memoris, ke ĝi mem unufoje, ian helan septembrotagon, per tiu fadeno iris malsupren. Ankaŭ ĝi ne memoris, ke ĉi tiu fadeo mem tiom multe utilis, kiam la fadenaro devis esti ŝpinata kaj pligrandigata.

La araneo ĉion ĉi forgesis. Ĝi nur vidis, ke ĉi tie troviĝis malsaĝa senutila fadeno, kiu neniel utilis, kaj nur finiĝis en la senaĵa aero.

For..l ekkriis la araneo, kaj per unu nura mordo ĝi traŝiris la fadenon.

La saman momenton la teksaĵo malfermiĝis - la tuta arte kunmetita fadenaro ruiniĝis - kaj kiam ĝia sento revenis, la araneo kuŝis inter la folioj de l'dornbarilo, kaj ĉirkaŭ ĝia kapo la araneaĵo estis volvita kiel malgranda kaj malseka tolero. En una nura momento ĝi estis neniiginta ĝian tutan belegecon, tial ke ĝi estis nekompreninta la utilon „de l'fadeno de supre".

Tradukis H. OONINCX.

OFICIALA PARTO.

Bondsbestuur.

Tot leden van het Bondsbestuur zijn gekozen.

P. Janssen, Nieuwendijk 183, Amsterdam.

Th. C. van Erp, Antwerpsche straat 27, Bergen op Zoom,

L. van Rijckevorsel, „Selissen", Boxtel.

Th. F. Schaepman, Parkstraat 128, Breda.

P. B. Disch, Brinklaan 182, Bussum.

W. Penders, Grave, (La Eĥo de la Kuijklando).

H. F. Pothast, Brueghelstraat 63, 's-Gravenhage.

H. Damen, St. Crispijnstraat 57, 's-Hertogenbosch.

J. P. L. Niesten, Claes de Vrieselaan 67, Rotterdam.

F. Marrevee, Warande 81, Schiedam.

L. J. J. M. Poell, Capucijnenstraat, Tilburg.

J. G. Coenen, Uden.

H. Linnebank, College der Kruisheeren, Uden.

J. de Vos, Veghel.

J. Verlaan, Panhuisstraat, Venlo.

De vergadering van het Bondsbestuur zal worden gehouden op Zondag 20 April, des namiddags ten 1 ure in het „Casino" Papenhulst, te 's Hertogenbosch.

Door de plaatselijke vereenigingen

van 's-Hertogenbosch, 's-Gravenhage, Tilburg en Uden II (Voor kunde en kunst) zijn alle aftredende leden van het Dag. Bestuur candidaat gesteld voor de verkiezing van het Dag. Bestuur.

Jaarvergadering.

Te laat om in den beschrijvingsbrief voor de jaarvergadering (zie Maart-nummer) te worden opgenomen is het volgende voorstel ingediend:

De Katholieke Esperantisten Vereeniging te 's-Gravenhage stelt voor:

dat de Ned. R. K. Esp. Bond „Nederlanda Katoliko", een verzoekschrift richte aan den Algemeenen Nederlandschen Bond „Vrede door Recht", om bij gelegenheid van het in September 1913 te 's-Gravenhage te houden „Wereldcongres voor den Vrede", een spreker met een rede in 't Esperanto te laten optreden.

Amendementen.

De 's-Hertogenbossche Katholieke Esperantisten Vereeniging heeft de eer het volgende amendement voor te stellen op voorstel III (van Tilburg) van den beschrijvingsbrief voor de jaarvergadering:

In de tweede alinea van het voorstel te lezen achter „Patronaten": *en handelscursussen der Hanze.*

In te lassen achter de tweede alinea:

De Dagelijksche Besturen der Diocesane Hanze-Vereenigingen te verzoeken de noodige stappen te doen, dat op de cursussen in boekhouden, handelsrekenen enz, uitgaande van „De Hanze", aan de leerlingen gelegenheid worde gegeven, om Esperanto-onderwijs te genieten, en bij de examens voor het Hanze-diploma ook het verkrijgen van een bewijs van bekwaamheid voor Esperanto mogelijk te maken.

De derde alinea van het voorstel, in verband met het vorenstaande te lezen:

En noodigt de plaatselijke vereenigingen uit, de onderwijskrachten voor het aanleeren der wereldhulptaal op de Patronaten en de Handelscursussen der Hanze, beschikbaar te stellen.

Toelichting. De Bossche vereeniging stelt dit amendement voor, omdat zij, althans wat de Hanze in het Bisdom Den Bosch betreft, de zekerheid heeft, dat het Dag. Bestuur der Hanze de Esperanto-beweging volle sympathie toedraagt en een verzoek als hierboven genoemd bijna zeker een gunstig onthaal zal vinden, terwijl zij eenzelfde welwillende houding ook van de besturen der Hanze in andere diocesen durft verwachten.

Aangezien de Hanze zelf examens afneemt, is het ook wenschelijk, dat het bewijs van bekwaamheid in Esperanto ook door de Hanze wordt verstrekt. De verandering der derde alinea, die nu de vierde wordt, geldt alleen een redactie-wijziging in verband met de inlassching.

„Nia Kredo" stelt het volgende amendement voor op voorstel IV (van Veghel.)

Nia Kredo stelt voor de inrichting van de leeskringen niet voor het geheele land te organiseeren, maar uitsluitend tot de plaats zelf te bepalen en dan zoo klein mogelijk zoowel wat tijdschriften als deelname van personen betreft.

Reden: Nia Kredo zou dit amendement niet ingediend hebben, indien zij op dit punt niet kon spreken van ondervinding. De proef n.l. in onze Vereeniging genomen leerde ons, dat een leeskring bestaande uit vier à vijf tijdschrijften geen blijvend succes is, de praktijk leerde ons, dat de theorie, hoe mooi ook ineengezet, in deze zaak *zeer moeilijk* te verwezenlijken is. Het is daarom wenschelijker den leeskring uitsluitend tot de plaats zelve te bepalen, waaraan twee à drie personen deelnemen en het aantal tijdschriften op twee, op zijn hoogst drie te stellen.

Mededeelingen.

Elke plaatselijke vereeniging kan zich door een stemgerechtigd lid (vertegenwoordiger) ter jaarvergadering doen vertegenwoordigen. De vertegenwoordiger *moet voorzien zijn* van een *schriftelijke machtiging* (geloofsbrief), onderteekend door den *Voorzitter* en *Secretaris* der vereeniging. Zonder van deze machtiging voorzien, heeft de vertegenwoordiger *geen* stemreeht. Iedere vertegenwoordiger brengt een bepaald aantal stemmen uit volgens de tabel bepaald bij Art. 15 van het Huishoudelijk Reglement.

Het stemrecht wordt alleen door de vertegenwoordigers der plaatselijke vereenigingen uitgeoefend.

De vergadering is toegankelijk voor de leden der plaatselijke vereenigingen, begunstigers en belangstellenden.

Voor het Dag. Bestuur.

H. B. VAN ZWET,

1e Secretaris.

Ŝanĝoj en la anara listo ĝis la 15a de Februaro 1913a.

FAVORANTOJ.

Novaj: Fino D. Th. Bruêns. *Ootmarsum.*

S-ro J. K. Dankbaar, Lieveldersstraat, *Groenlo.*

Adresŝango: S-ro P-o P. Pulskens, Helmond al *Haaren*, (Oisterwijk) Groot-Seminarie.

UNUIĜOJ.

Amsterdam „Nia Kredo".

Estrarŝanĝoj:

Prezidanto: S-ro P. Janssen, Nieuwendijk 183.

Sub. prezidanto: S-ro J. F. A. Jansen. Bilderdijkkade 22.

1a Sekretario: G. J. C. H. Claassens, Brouwersgracht 68.

2a Sekretario. S-ro A. van Dam, Kanaalstraat 38I.

Kasistano: F-no Chr. Kamp, O.Z. Voorburgwal 167.

Novaj nembroj:

F-ino S E. H. Droop, Rhijnvis-Feithstraat 56III.

R.K. Vereeniging van Post-Telegraaf en Telephoonpersoneel „St. Gabriël", adres: Frederik Hendrikstraat 156,

R.K. Vereeniging van Gemeentewerklieden „St. Laurentius", adres: v. d. Hoopstraat 4 III.

TILBURG.

Nova membro:

S-ro L. C. Dankers, Koestraat 60.

PETO!! Ni petas insiste al la Sekretarioj (inoj) de la unuiĝoj ĉiam sendi la ŝanĝojn en la anara listo antaŭ la 15a de ĉiu monato al la ĉefsekretario de Nederlanda Katoliko S-ro H. B. van Zwet, Leeuwstraat 3bis Utrecht.

Saman peton al la favorantoj pri adresŝanĝoj.

Plendojn, pri la neregula ricevo de nia organo „Nederlanda Katoliko" al la sama adreso.

ENLANDA KRONIKO.

Por niaj sekretariinoj kaj sekretarioj!

Al vi afabla, kaj insista peto; sendu ĉiam raporton pri okazintaj kunvenoj en via klubo, rekte al la redakcio de „Nederlanda Katoliko". Ofte membroj plendas, ke neniam ili legas en nia organo pri la agado de sia klubo. Vere, ili ofte rajton havas. La rubriko „Enlanda Kroniko" en nia organo ne estas sufiĉe kompleta. Okazas multaj kaj ofte gravaj kunvenoj

aŭ festoj, kiuj ja eliras de unu el la sekcioj de „N. K.", pri kiuj neniam la redakcio ricevas eĉ raporteton. Volonte ni presigos ĉiumonate multaj okazintaĵoj el niaj katolikaj Esperanto-kluboj. Unu lernas de la alia. Unu instigas la alian. Sendu do viajn raportojn, karaj gesamideanoj; sendu ilin tuj post kiam la kunveno estas okazinta. Sed ne nur pri kunvenoj vi raportu, sed pri ĉio, kio koncernas la lokan propagandon. Viajn raportojn vi faru ne tro longe, sed nepre verku ilin en Esperanto. „La redakcio ne estas tradukmaŝino" skribis antaŭ kelkaj monatoj la redaktoro de „La Holanda Pioniro". Tion pripensu, karaj raportontoj. Se eble al iu el niaj sekretari(in)oj estus neebla plenumi ĉi tiun afablan peton, tiam ili ja povos zorgi, ke tiu tasko estu farota — *regule* — de alia estrarano aŭ fervora membro

Ni baldaŭ do havos ĉiumonate tre interesan „Enlandan Kronikon".

H.D.

Ons Propaganda-sluitzegel.

Om onze propaganda - sluitzegels onder het bereik te brengen van een ieder, zijn deze verkrijgbaar gesteld aan het Secretariaat van den Bond: Leeuwstraat 3 bis, Utrecht.

Vooral onze begunstigers worden er op attent gemaakt dat de sluitzegels in iedere hoeveelheid worden geleverd. De prijs is 5 stuks voor 1 cent.

Bij afname van minstens 250 stuks, wordt tegen inkoopsprijs geleverd d.i. 250 stuks à f 0,25.

Bestellingen niet vergezeld van geld worden niet uitgevoerd.

Tentoonstelling Tilburg.

Esperantodag 6 Juli 1913.

De organisatie van dezen Esperanto-dag is reeds eenigen tijd in vollen gang, zoodat wij met recht eene voortreffelijke regeling kunnen verwachten. Men verwacht een zeer groot aantal deelnemers uit alle oorden des lands.

Het feit dat deze Esperantodag verbonden is met de internationale tentoonstelling, die in Tilburg gehouden wordt zal zeker veel tot succes bijdragen. Want er is in den lande nog maar één roep over de bekende Tilburgsche tentoonstelling van voor eenige jaren. En deze tentoonstelling zal, naar ons wordt medegedeeld, de vorige nog in vele opzichten overtreffen. Wie dus deze tentoonstelling wenscht te bezoeken, kan zelfs geen Esperantist zijnde, niet beter doen dan zijn bezoek op dien dag te bepalen. Want door het tentoonstellingsbestuur zijn met het oog op de te verwachten groote deelname aan den Esperantodag speciale maatregelen getroffen, en terwijl extra feestelijkheden worden in het vooruitzicht gesteld zullen de Esperantisten tot bijzonder gunstige tarieven toegang verkrijgen. In ons volgend nummer hopen wij nog nadere bijzonderheden te kunnen vermelden. Volstaan mij voor heden met de mededeeling, dat verschillende commissien benoemd zijn o. a. tot regeling van: Ontvangst, Verblijf, Vergaderingen, Versieringen en eindelijk de Perscommissie, die zeker niet de minst belangrijke is. Van deze laatste is secretaresse Mej. Henriette Claassen, Prinses Sophiastraat 3 te Tilburg.

Het lijdt niet den minsten twijfel, dat deze Esperanto - feestdag eene grootsche en indrukwekkende propagandabetooging zal worden voor onze internationale hulptaal, en dàt niet alleen voor de Tilburgenaren, doch voor alle bezoekers van de tentoonstelling.

En behalve het speciale propagandamiddel, waarover men op het in dit nummer ingesloten bijvoegsel lezen

al stacio Jungfraŭjoch, meze de gla-kan zal bij deze gelegenheid voor het eerst een nieuw propagandamiddel in gebruik worden gesteld, dat gewis door alle Esperantisten met luid gejuich zal worden begroet.

D. H.

Esperantodag Tilburg 6 Juli

Ingevouwen vinden onze lezers eene circulaire van de Persclub voor de streekvergadering op Juli a. s. te Tilburg. Iedereen beijvere zich voor deze goede zaak en brenge minstens eene advertentie aan. In ieder geval, indien men zelf niet voor adverteeren in de termen valt, getrooste men zich de moeite de circulaire aan een bekend adverteerder door te zenden. Betere gelegenheid tot het plaatsen van advertentiën is wel niet denkbaar.

Groenlo. La Groenloa Esperanto-grupo organizis propagrandan vesperon, la 31an de Marto. Paroladis elokvente s-ino v, d. Vet Dirksen el Hago. Laŭ la loka gezeto, kiu favore raportis pri tiu-ĉi kunveno, la parolado akiris grandan aplaŭdon de la publiko ĉeestanta multenombre. Specialan atenton meritis kaj akiris la vastega ekspozicio de Esperantaĵoj, precipe Esperanto-gezetoj kaj libroj. La katolikaj eldonaĵoj estis bone riprezentataj.

Eksterlanda Kroniko.

IX. Universala Kongreso de Esperanto

Berno 24—31 Aŭgusto 1913.

Duan fojon Svislando havas la honoron kaj la feliĉon gastigi la internacian Esperantistaron. Ĉi tiun fojon la svisa Ĉefurbo Bern mem afable akceptos la gastojn. Ĉe la piedo de la neĝkovrita Alparo sidas la svisa metropolo, ĉirkaŭfluata de rava verda rivero Aare, kaj loĝata de inteligenta kaj laborema loĝantaro.

La regiono de la urbo kaj de ties ĉirkaŭaĵo estas tre varia rilate al vidindaĵoj kaj belegaj punktoj. Ĉiuj vizitantoj de Bern estas ravitaj pro ĝia arta, serioza, pura kaj nekomparebla eksteraĵo. Dum la lastaj jardekoj la urbo multe pilgrandiĝis, ĉar oni konstruis grandan nombron da arte aspektaj domoj kaj palacoj. Inter ili troviĝas la nova Universitato sur monteto meze de la urbo, el kie oni ĝuas plej belan aspekton de la tuta neĝa Alparo, kaj la grandioza Kazino sur la pentrinda bordo de la Aare. En ambaŭ okazos la kunvenoj kaj festoj de la Naŭa. La organizado de la granda festo bone marŝas pro la favora helpo de la aŭtoritatoj kaj la sindono de la tuta loĝantaro. La kongresanoj renkontos tutan serion da amuzaĵoj kaj belaj festoj. Laŭ la provizora programo, kiu cetere fariĝos definitiva tuj post aliĝo de sufiĉe granda nombro de samideanoj, ni havos la jenajn festaranĝojn: La internacia kostumbalo en la paradizaj haloj de la Kazino. La samideanoj bonvolu pretigi kaj alporti siajn naciajn kostumojn. Grandan koncerton de Berna virĥoro kun diversaj gesolistoj. Ekskurso en la plej belan parton de la svisa Alparo (tutan tagon) kun pikniko kaj koncerto en Interlaken, veturado sur belega lago de Thun, meze de la montegoj, kaj vespermanĝo en Thun. Teatra prezentado (Originala verko en Esperanto). Festeno sur monto Gurten apud Bern (alteco 860 m) kun „Jodlada" koncerto, svisaj luktludoj k.t.p.

Ekskursoj de unu aŭ kelkaj tagoj sur la plej konatajn pintojn de la Alparo kun plej lertaj gvidistoj La diversaj alpaj fervojoj donas specialan rabaton por la kongresanoj, ekzemple la fervojo de la Jungfraŭ, plej alta montego en Bernaj Alpoj (4167 m) konsentas tiel grandan rabaton ke kongresanaj povos veturi

al stacio Jungfraŭjoch, meze de glaciaroj, tie tagmanĝi kaj reveni Bernon por la ridinda sumeto da 10 Spesmiloj! Do kiu neniam havis le feliĉon vidi eternan neĝon aŭ marŝadi sur glaciaro, en Aŭgusto, tiu venu al nia kongreso kaj li povos ĝui tiun feliĉon.

En la kongresa kunvenejo troviĝos aparta poŝtoficejo por la kongresanoj, kie la oficistoj parolos Esperanton kaj stampos la leterojn per speciala stampilo en nia lingvo.

Ni ĵus eldonis du belajn poŝtkartojn multkolorajn. La unua surhavas aspekton de la urbo Bern kun la Alparo en la fundo, la dua vidigas belan kaj artan esprimon de la internacia ideo. La bildo de ĉi tiu poŝtkarto ankaŭ vidiĝas sur la sigelmarko ĵus eldonita. (Prezo de la poŝtkartoj po peco 4 sd. — 10 centimoj — kaj de la sigelmarko 40 sd. — unu franko — por 100 pecoj.) La insigno el arĝento, estos la plej bela el ĉiuj ĝisnunaj kongresinsignoj.

Grave por ĉiuj vizitantoj de Svislando estas, ke niaj fervojoj eldonas specialajn abonbiletojn por 15 aŭ 30 tagoj. Tiuj biletoj kostas por 2a klaso 65, por 3a klaso 45 frankojn por 15 tagoj kaj valoras por ĉiuj fervojoj de la tuta Svislando, escepte la privataj fervojoj sur la montoj kaj kelkaj apudaj, cetere tre malgravaj, linioj. Tiuj biletoj estas treege praktikaj por fari vojaĝojn tra la tuta paradiza lando kaj viziti ĉiujn belajn lokojn. Ni tial rekomendas al ĉiu kongresano aĉeti tuj ĉe la landlimo tian bileton, se li intencas restadi kelkajn tagojn post la kon greso en Svislando. Sed en la okazo, ke li volas viziti nur la kongreson kaj la postkongresan vojaĝon, li aĉetu ĉe la landlima stacio bileton por iro kaj reveno, tiaj biletoj estas tre malkostaj; ekzemple de Ĝenevo al Berno la simpla bileto kostas — en tria klaso — Fr. 8.25, por iro kaj reveno ĝi kostas Fr. 10.30, la reveno kostas do nur 2 Frankojn, aŭ kvaronon de la iro. Tia duobla bileto valoras dum 10 tagoj!

Svislando estas ĉiujare la renkontejo de milionoj da fremduloj el ĉiuj kontinentoj, kaj ni konsilas al la Esperantistaro atentigi eventualajn vizitontojn de Svislando pri la favoroj, kiujn povos havigi al ili la kongreso, por ke ili uzu tiun tempon por sia vizito, sĉ estante neesperantistoj, sed pagante la kongresan kotizon da 6 Spesmiloj.

Por la organizado de la dum- kaj postkongresaj vojaĝoj la Kongresa Komitato faris kontrakton kun bona firmo, kiu zorge kaj detale preparas nun la diversajn projektojn. En unu el niaj estontaj cirkuleroj ni donos la necesajn informojn.

La subkomitato por la Loĝado eklaboris kaj povas de nun plenumi la petojn pri ĉambroj k.t.p.

Por personoj dezirantaj restadi ĉu antaŭ ĉu post la kongreso kelkajn tagojn aŭ semajnojn en bonaj ripozejoj, la komitato preparas liston de tre rekomendindaj pensionoj en la ĉirkaŭaĵo de Bern kaj en aliaj partoj de la lando. Aliĝoj al tiaj pensionoj ni de nun kolektos kaj donos informojn pri prezoj k.t.p.

Kaj nun, karaj samideanoj el tuta terglobo, venu multnombre al nia bela kongreso, sendu tuj vian aliĝon kun la responda kotizo da 15 Fr. (6 Sm.) al la „Kantonalbank" en Bern, mendu viajn ĉambrojn kaj la diversajn eldonaĵojn de la kongreso, poŝtkartojn, sigelmarkojn, por fari per ili propagandon.

Kun samideanaj salutoj,

La Direktanta Komitato.

Uit „Deutsch Östenreichischer Esperantist."

Als direct gevolg van de preek, door Monseigneur Dr. Aleksandro Gieszwein, tijdens het Eucharistische congres in de Canisiuskerk te Wee-

nen gehouden, is aldaar de Oostenrijksche Katholieke Esperantistenvereeniging opgericht, die zich ten doel stelt de verspreiding van Esperanto in Katholieke kringen en vereenigingen Na de oprichting zijn er reeds verscheidene propagandalezingen gehouden en cursussen gegeven. De blijken van instemming, die van vele zijden ontvangen werden, bewijzen, dat er behoefte bestond aan zulk een vereeninging van Katholieken.

Het vierde internationaal Katholieke Esperanto congres zal, zooals men weet, te Rome gehouden worden; het congres zal, wijl het ditmaal in de stad van Z. H. den Paus gehouden wordt, meer het karakter van een grootschen pelgrimstocht aannemen. Wij twijfelen niet of zeer velen zullen van deze gelegenheid gebruik maken om den Heiligen Vader te kunnen zien en tegelijk de verbreiding van Esperanto te bevorderen.

Duitschland. De Duitsche Esperantisten organiseeren een Esperantocongres te Stuttgart, dat vooraf zal gaan aan het negende Algemeen Esperantocongres te Bern.

H. v. G.

Gedurende de Paaschdagen werd te Frankfort/Main de tweede Bondsdag van den Duitschen Werkliedenen-Esperantisten-Bond gehouden. Groot was de deelname en niet minder groot het enthousiasme der deelnemers, die waarlijk dagen van afwisseling moeten hebben meegemaakt. Op den begroetingsavond werd gesproken door vertegenwoordigers uit Nederland, Frankrijk, Spanje, Rusland, Polen en Bohemen. Uit het verslag bleek, dat bovengenoemde bond tegenwoordig 62 afdeelingen telt. Door den Heer van Riesen (Hamburg) werd een voordracht gehouden over „*Wert eines internationalen Zusammenschlusses und die Grundbedingungen einer internationalen Arbeiter Esperantisten - Organisation*". Na afloop eener uitvoerige discussie aan welke o.a. Redacteur Serone van de L'Humanité (Parijs) Majer (Haag) Blay (Rusland) en Nemec (Bohemen) deelnamen besloot men op het in 1914 te Parijs te houden internationale Esperantisten Congres tot de oprichting van eenen internationalen arbeiders Esperantisten-Bond over te gaan.

.F. S.

ENSENDITA.

Vizitu ni grandare nian Jarkunvenon!

Vere, ne estas necesa, ĉi tie instigi la konstantajn vizitantojn de niaj jarkunvenoj, ĉar por ili estas ĉi-tiu alvoko superflua; ili ja venos, ankaŭ sen tiu-ĉi mia instigo. Mi tamen esperas, ke per mia skribaĵo, mi atingos la atenton de tiuj, kiuj ankoraŭ ne spertis la interamikecon de tiuj jarkunvenoj, kaj senhezite mi kuraĝas deklari, ke tiun ĉi fojon, ĝi estos ne malpli interesa ol la jam okazintaj en 's-Gravenhage kaj Schiedam. La proverba bonkoreco kaj gajemeco de la Nord-Brabantanoj garantias tion nepre. Tial estis al mi granda ĝojo, kiam mi sciiĝis, ke ĝi nunan jaron okazos en la ĉefurbo de Nord-Brabanto, kie precipe lastatempe regas ekzempla interesiĝo por Esperantismo. Cetere, mi supozas, por multaj la nura rigardado de la „griza dukurbo" estos plenvalora kompenso por la farotaj elspezoj. Laŭ la programo, ni jam povis konatiĝi kun la bonega aranĝo de la 20 April-tago. Laŭdon al la fervora estraro de la tiea sekcio de N.K. Mi volas fini per jenaj vortoj:

Gesamideanoj kiuj ankaŭ ĉeestis la antaŭajn kunvenojn, ne preterpasigu la nunan aranĝon en 's-Bosch, kaj al

la neniam ĝis num ĉeestintoj mi alvokus: Venu, venu grandnombre, por ke tiu tago estiĝu entuziasma manifestacio por katolika Esperantismo. Tiel faronte, vi kunigos utilaĵon kun agrablaĵo.

HAGO. G. v. O.

BIBLIOGRAFIO.

Studo Pri La Organizo de Esperanto, Étude Sur L'Organisation De L'Esperanto.

Eldonejo de Franca Esperantisto, 51 Rue de Clichy Parizo. Prezo fr. 0.75.

La broŝuro estas represo el „Franca Esperantisto" kaj verkita en Esperanta kaj franca lingvoj. Ĝi pritraktas la historion de la „organiza Demando", de la Antverpena kongreso ĝis post fino de la oka, Krakova kongreso kaj enhavas multajn oficialajn dokumentojn, pro kio ĉi tiu broŝuro estas facila kaj konfidinda manlibro.

Karaktero, laŭ Mr. J. M. van Stipriaan Luïscius, advokato en Hago. Dua plivastigita kaj plibonigita eldono, tradukita laŭ la 6a eldono de l' Nederlanda originalo kaj kontrolita de la „Esperantista Literatura Asocio." Librejo „Espero" Hago. Prezo f 0.25. Sm. 0,200.

Ni jam recenzis ĉi tiun valorplenan verkerton en nia numero de Januaro 1912. Ke la eldonaĵo trovis bonan akcepton en Esperantujo, tion ja pruvas la fakto, ke dua eldono fariĝis necesa. La tradukinto estas la konata sinjoro J. L. Bruijn el Hago. Laŭ stila vidpunkto la dua eldono gajnis ankoraŭ multe, evidente ankaŭ per la kunhelpo de la Esperantista Literatura Asocio. Volonte mi refoje rekomendas la legadon de „Karaktero," precipe al instruistoj, kvankam restas ankoraŭ mia rezervo, jam nomita en la unua recenzo, pri la plena manko de relegia bazo, priparolante la homan karakteron.

Universala Leterafranko. Arnold Behrendt, Breslaŭ. Prezo nemontrita. Ĉiun negociston interesos tiu ĉi broŝuro de supera Poŝtpraktikanto Behrendt, la prezidanto de la internacia ligo de Esperantistaj Poŝtoficistoj (Ildepo) Ĝi traktas pri unuecaj poŝttarifoj, proponas kaj defendas la malaltigon de la nuna, - vere tro alta - internacia leterafrarko de 25 centimoj aŭ koresponda valoro.

En la libreto estas precipe interesaj la detaloj pri la diversaj malnovaj tarifoj por leter-afranko.

Lernolibro de la plej simpla kaj plej facila:

Esperanta Stenografio de Ludoviko Jakab. Aĉetebla ĉe Ludoviko Kókai Budapest IV Karolyi-utca 1 sz. Prezo Sm. 0,200 (sen afranko.) Originala sistemo de Esperanta Stenografio prezentas la verkisto en la unua numero de la „Internacia Stenografia" Biblioteko. En sia antaŭparolo la verkinto komunikas, ke en lia biblioteko *la sinsekvaj kajeroj aperos de tempo al tempo* en kiuj li i. a konigos ĉiujn *pli gravajn stenografiajn sistemoj.* La libreto do estas tre interesa por stenografiistoj kaj amantoj de stenografio. Ĉu la nova sistemo efektive estas pli taŭga ol la al Esperanto jam adaptitaj sistemoj, me ni povas prijuĝi.

Kion Patrino Povas Suferi de Hendrik Conscience. Tradukis Frans Schoofs.

Eldonejo de „Belga Esperantisto" Vondelstraat 20 Antwerpen. - Prezo Sm 0,200. Certe, multaj el niaj legantoj jam legis ĉi tiun ĉarmoplenan rakonton en originala lingvo. Tiuj konas do la emocian verketon, veran specimenon el la verkaro de la granda flandra verkisto.

Kaj, legante la esperantan tradu-

kon, ili reĝuos la specialan, rimarkindan Conscience-stilon. Ĉar tiun sciis bonege konservi la lerta tradukinto. Pri la verketo mi do nur bonon povas diri.

Ĝia eksteraĵo estas bela kaj komforta, la preso bona kaj la prezo ne tro kara.

La verdkovrita libreto, portante la kvinpintan stelon estas vere stelo brilanta en nia traduka literaturo.

Oficiala Jarlibro de la Universala Esperanto Asocio 1913. Genève 10 Rue de la Bourse. Prezo Sm 1.

Tiu ĉi jarlibro estas senpage por la membroj de U E. A. Bedaŭrinde, tro multaj Esperantistoj ne estas ankoraŭ sufiĉe informataj pri la utilega laboro sur kampo de praktiko, kian faras la Universala Esperanto-asocio.

Tiuj personoj aĉetu la recenzatan jarlibron. Tiam ili plene konvinkiĝos pri la graveco de U. E. A. La riĉenhava libro valoras sian prezon. Krom la multaj oficialaj dokumentoj, listoj de delegitoj troveblaj sur la tuta mondo, k. t. p. ĝi enhavas ankaŭ tre interesan mallongan priskribon pri ĉiuj landoj, en kiuj la U. E. A. havas delegitojn, (Kaj tiuj estas preskaŭ ĉiuj kulturlandoj !) pri ĝiaj loĝantaroj, produktaĵoj, armeoj, k.t.p.

El la libro mi citos ankoraŭ kelkajn ciferojn: La 1an de Novembro 1912, U. E. A. kalkulis 9.096 membroj kaj 300 Esperantiajn Entreprenojn (firmoj, societoj, k. t. p.) La asocio enhavas 1,617 membrojn en Germanujo, 1,215 en Francujo, 1,032 en Rusujo; 936 en Granda Britujo, 424 en Austrio Hungarujo, k. c. kaj 834 ekster Europo. Ĝiaj 1.161 Delegitoj estas dissemitaj en ĉiuj partoj de la tergloblo. Dum 1911, U. E. A. faris al siaj membroj 10.475 servojn en la plej diversaj fakoj de la tutmonda vivo: komerco 2.698, Junuloj kaj studentoj 581, turismo 1.252, servoj al vojaĝantoj 1.704; diversaj 4.293. Ĉi tiuj ja estas ciferoj, kiuj parolas pro si mem.

H. D.

Pri la Deveno de Poŝtmarkoj.

Eĉ por „grizaj" praepokoj oni povas pruvri la ekzistadon de pli aŭ malpli perfektaj poŝtorganizaĵoj, sed pri la poŝtmarko, aŭ pri simila anstataŭaĵo, ni nenion trovas en ĉiaj tradicioj. Tamen la poŝtmarko ne esta eltrovita en la nuna epoko, ĉar jam en Aŭgusto 1653 en Francujo paperetoj kun la presitaj vortoj „port paye" kun la dato kaj jaro ktp. estis eldonitaj, por faciligi la afrankigon de la leteroj, kiuj estis sendotaj en la urbo Paris. Tia papereto kostis unu solon (sou), eĉ ekzistis afrankodevo. En ĉiuj urbopartoj, eĉ en la antaŭurboj, leterkestoj estis starigitaj, kiujn oni nomis „boettes"; ili estis regule malplenigitaj je la sesa kaj la dekunua matene kaj je la tria posttagmeze. Sed ŝajne oni ne havis en tiu tempo de daŭrantaj militoj la ĝustan komprenemon por ĉi tiu afero, ĉar tre baldaŭ malaperis la poŝtmarkoj kaj ankaŭ la leterkestoj.

Ordinare oni diras, ke la poŝtmarkon elpensis la brita ĉef-poŝtestro Hill (1840), sed, escepte de alia landoj, jam en la jaro 1135 alia brito, sinjoro Knight, propodis la enkondukon de stampitaj kovertoj, kaj parlamentraporto el 1835 enhavis similajn proponojn. La regno Sardinujo eldonis jam en 1819 stampitajn foliojn kiel kovertojn por leteroj, por dekkvin, dudekkvin kaj kvindek centesimoj, kaj en Stockholm jam en 1823 oficiro faris detalajn proponojn al la regna konsilantaro pri la enkonduko de poŝtmarkoj. Tre verŝajne estis la libristo James Chalmers el Aberdeen, multe pli frue ol Hill, tiu, kiu ekkonis la gravecon de la poŝtmarko por

la poŝtrilatoj. La brita ĝeneralpoŝtestro Hill certe havas la grandan meriton, esti realiginto de la praktika efektiveco, tute konvinkita pri la graveco de la elpensaĵo por la poŝtrilatoj. Ĉar samtempe kun la enkonduko de la penny-afranko en Britujo en 1840 aperis la unuaj poŝtmarkoj eĉ jam en sufiĉe artista aranĝo; oni nomis ĉi tiujn poŝtmarkojn „Queenshead" (reĝinkapo), ĉar ili montris la portreton de la reĝino. La unuaj britaj poŝtmarkoj por unu penny estis nigraj, la markoj por du pence estis bluaj.

En sia biografio la eminenta brita poŝtĉefo, al kiu oni certe konsentos eksterordinaran grandiozecon en la administrado de la poŝtaferoj, donas jenajn klarigojn, kiuj estas citindaj por la historio de la poŝtmarko: „la sola kontraŭdiro, kiun oni faris al mi rilate al la komuna uzado de ĉi tiu sistemo (nome stampitaj kovertoj) estis la jena: Personoj, kiuj ne bone scias skribi leterojn, embarasiĝus, kiel komenci la aferon. Ili eble sendos siajn leterojn al la poŝto aŭ ili mem tien portos ilin, ne uzante la stampitajn kovertojn. Ja estas ĝuste, ke la akceptanta oficisto ĉe la enpoŝtigo de la letero, anstataŭ akcepti la nomon por la sendkostoj, donos leterkoverton, en kiun la sendanto povus enmeti sian leteron, kaj poste li skribus la adreson; sed ofte la sendanto ne scios la skribarton. Tiu ĉi malfacilaĵo estis evitata, se oni vendas nur malgrandajn biletojn nur surfiĉe grandajn, por-ke ili surhavu la stampon; dorsaflanke ili estu provizitaj je gluaĵo, la sendanto malsekigas kaj gluas ilin sur la dorsan flankon de la letero.

Sed efektive jam Chalmers antaŭ Hill estis espriminta ĉi tiun ideon, kiu, praktike plenumata, kondukis baldaŭ al la enkonduko de la poŝtmarko. Certe, estis feliĉa okazo, ke la ideo de la enkonduko de la poŝtmarko ne sole trovis fervoran akceptlon en la brita poŝtadministro, sed ke ankaŭ la eltrovo ĝuste eliris el Britujo, kiu jam tiam subtenis viglajn komerc-interrilatojn.

Instigite de Anglujo sekvis Brazilujo jam en 1843 rilate al la enkonduko de la poŝtmarko, 1844 Genève, 1845 Finlando, 1846 la Unuigitaj Statoj de Nord-Ameriko, 1848 Rusujo, fine 1849 Aŭstrujo kaj malmulte pli poste la iom grandaj germanaj ŝtatoj,

La verkisto Moritz Ruhl diras en siaj citaĵoj pri nia temo la jenon: La poŝtmarkoj, tiuj ĉi signifoplenaj atestantoj de la granda internacia rilataro, de la senĉese kreskanta, spirita kaj intima komunikiĝo kaj interkompreniĝo de la popoloj de la tuta terglobo, estas, escepte de la metalsona mono, la solaj interkompreniloj, kiuj ĉie, en Ameriko, en Azio, en Aŭstralio kaj en Afriko, estas komprenataj egale perfekte HANS NEUMAN.

El La Verda Standardo.

ESPERO KATOLIKA.

Internacia monata gazeto.

Honorita per Apostola Beno de Pio X-a, 27-an de Junio 1906.

Oficiala Organo de Internacia Katolika Unuiĝo Esp. (I.K.U.E.)

Religia Direktoro: PASTRO RICHARDSON,

Redaktoro: D-RO SMULDERS.

Administranto: S-ro F. SLEIJFFERS, Prins Hendrikstr. 93, Den Haag.

Machinale Fabriek van Houtbewerking
„DE MARK".

Jac. van Groenendael, Breda

Alle Timmerwerken, Speciaal in Eikenhout

KERKBANKEN - KERKSTOELEN
SCHOOLMEUBELS, enz.

Wie Sociale en Politieke lectuur wenscht te ontvangen wende zich tot

„FUTURA" - LEIDEN.

Een der Beste Leerboeken.

„Een der beste leerboeken over Esperanto, die wij ooit onder de oogen kregen". Aldus luidde de conclusie der „Nieuwe Haarlemsche Courant" over het leerboek in het Esperanto door Majoor J. P. L. NIESTEN.

De prijs van dit volledig leerboek met opgaven en uitwerkingen, bevattende 275 bladzijde is f 1.50.

JAARVERGADERING

's-HERTOGENBOSCH. - 20 APRIL 1913.

Onverwijlde aangifte voor deelname dringend gewenscht.

Na ontvangst van postwissel wordt programma, waarop o.a. Esperanto-liederen, onverwijld toegezonden, alsmede de betreffende kaarten. Voor deelname aan Lunch, Diner en Feestelijkheden zende men postwissel ad f 2,50. Voor Diner en Feestelijkheden f 1.80.

Voor Feestelijkheden afzonderlijk f 0,25. Hieronder is het bezoek aan de Chicago Bioscope, waarbij vertooning van Esperanto films en Portretten van bekende Esperantisten inbegrepen.

Adres: Den Heer J. PASTOOR, Po tbus 5. 's Hertogenbosch.

Voor Cadeaux

bij **Koperen, Zilveren** of **Gouden Feesten;** bij **Verjaardagen** of ter **herinnering** aan **overledenen** is er niets waardiger denkbaar dan in **natuurgetrouwe olieverfkleuren**

Geschilderde Portretten

PEINTURE-BOGAERTS.

Prijzen vanaf **f 8,25** met breede vergulde lijst.

Kunstinrichting

H. Bogaerts & Co. te Boxtel.

Bekroond met de hoogste onderscheidingen voor Schoone Kunsten; Eere Diploma's Gouden en Zilvere Medailles - - -

Uitv. geillustreerde Prijscourant gratis.

Geen portret mag behouden worden dat niet volkomen bevredigt.

LAATSTE HOOGSTE ONDERSCHEIDING ROME 1912.

Stoomdrukkerij P. J. STRIJBOS HUIJBERS, Eindhoven.